

R. TOBELLA

Eidonisto de CLAU ESPERANTO kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona
 ESPERANTA PRESEJO

TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperis nur en esperanta lingvo; literaturo, enlanda kaj eksterlanda movado, rakontoj, amuzoj por instruata praktiko k. t. p.

ĜARA AĖORO / Eksler Hispanujo. 4 frankoj (1'60 sm.)
 En Hispanujo . . . 3 . . . (1'25 »)
 UNO NUMERO 40 cmoj. (0'16 sd.)
 Per la abonantoj kaj kunlaborantoj 25 . . . (0'19 »)

Specimeno (nenomita numero) estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mendej devas esti akompanataj de mono.

Ĉiuj monsendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per franca rusa aŭ hispana papermono; per Internaciaj respondkuponoj da 10. sd. kaj per ĉekoj aŭ transpagiloj de la Cekbanko Esperantista.

Oni bonvotu skribi legeble sur respondpoŝtkarto, aŭ aldoni respondkuponon al la letero, se oni postulos respondon. Ĉiu nova abonanto ricevos senpage la eksterordinaran numeron de la V. Kongreso, samtempe ke li havos la rajton akiri la kolektojn de la jaroj 1908, 1909 kaj 1910 por la duono de sia valoro, t. e. po 1'50 fr. (sm. 0'60) ĉiu kaj, kiel la ceteraj abonantoj, povos mendi, por unu fojo dum la tuta jaro, trilinean anoncon.

ABONEJOJ

Francoj: Librojo de Esperanto.
 15, rue Montmartre - Paris

Katalunio:
 S-roj Suñer kaj K.º, Presejo - S. Feliu (tuitols).
 S-ro Rosals - Portaferrisa, 30, Barcelono.
 S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.
 S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafrugell.


TARIFA POR ANONCOJ

Tuta paĝo. . . 12 frankoj (1'80 sm.)
 Duono da paĝo 7 . . . (2'80 »)
 Kvarono . . . 3'50 . . . (1'40 »)
 Okono . . . 2 . . . (80 sd)

Anoncoj por peti korespondadon kostas 10 cmoj (1 sd.) ĉiu linio.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
 Tallers, 81 - Barcelono

Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro B. Anglada



LAMPARA C.

de filament metalle

Renneix totes les ventatges de la millor estrangera

Dura 2000 hores i es la més resistant

I un 40% mes barata

Preu unic, de 16 a 7 bugies, 2 PESSETES

Deposit i venda á BARCELONA:

Rambla de les Flors, 16, entlo

Oni parolas kaj korespondas komerce per Esperanto

★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legajojn de ĉiutandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas per ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj ĉu per privata legado.

Prezo po kajero 0,10 Sm (0,20 M.)
 Serio de 12 volumoj (afrankite) 1,25 Sm (2,50 M.)
 Ĉiu libroto enhavas 40 - 50 paĝojn.

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W., Linden - Strasse 18 - 19.
 Por Hispanio: Joan Rosals, Barcelono, strato Portaferrisa, 30

Bazar Esperantista

Specialaco en la mezuro de ĉemizoj por viroj. Konfekcioj por sinjorinoj kaj scinfanoj, kravatoj, poŝtukoj, gantoj, parfumoj, trikotajoj kaj aliaj artikoloj.

Tratador, 2-Juqueiros, 18
 BARCELONO

TUTMONDA ESPERO



Barcelono, Augusto-Setembro 1911

40 cent.

MISTERA KRIMO

Amaza unuakia komedieto. 1 fr. (0'400 sm.)

Unu fojon...!

Humorajaro tauga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

Mendeblaĵe ĉe MIKAELO CASES, Strato Salmerón, 229, 4.º - Barcelono (Espana)

LUEBLA

FORIGADO DE SILABOJ (VORTLUDO)

● ● * * ■ ■ " "

EN LA GRAMATIKO

● ● * * ■ ■

KUNIGANTA KORPORANO

● ● ■ ■

PARTO DE CIRKLO

● ●

SUFIKSO

NOVEJARQUE

TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4^a Jaro

Barcelono, Aŭgusto-Septembro 1911^a

N-roj 42-43

ENHAVO: Parolado de D-ro Zamenhof ĉe la malfermo de la sepa Kongreso Esperantista. — Zamenhof kaj Maragall. — Gaja kristnaska meditado pri Adamo kaj Esperanto. — Al subiranta suno. — Barcelono: Modernaj Konstruaĵoj Monumento al D-ro Robert. — La suno kaj la vento. — Lourdes'a internacia ligo esperantista. — Gedonacantoj por la ordeno de Isabel la Katólita al Sro. Dro. Zamenhof. — Diversaj sciigoj. — Bibliografo.

PAROLADO DE D-RO L. L. ZAMENHOF ĈE LA MALFERMO DE LA SEPA KONGRESO ESPERANTISTA



Kiel tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dan kon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto por la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbestro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan

dankon al tiuj niaj belgaj samideanoj, kiuj? tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelatto JOHANN MARTIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kuneestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankau revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj ski-

zoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas al kutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evoluiĝovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremeco, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritaj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonas klarigojn de mia flanko. Tial ne miru, ke mi ne prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la direktaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj,—tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la

tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato nek al la Komitato de la Kongresoj,—tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiu demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj, koncernas la *tutan* esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamiko; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organizon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la nuna momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; tre povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neakceptinda, kaj tiam—vi scias tion tre bone—mi ne penos altrudi ĝin al vi, kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kion ajn vi decidis,—ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian arangon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La arango de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi proponis al vi, aŭ ia alia simila arango, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝanĝos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo, kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj respektu nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas kaj morgaŭ povas ne vivi, kaj, kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradece.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena, estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni krii: vivu, kresku kaj floru nia afero!



ZAMENHOF KAJ MARAGALL

Ni publikigas la jenajn tradukojn el Goethe, kiel literatura kuriozaĵo kaj kiel pruvo de la lerteco de ambaŭ eminentoj tradukintoj ĉar la du fragmentoj tradukitaj el germana lingvo, estas mirinde tute samsencaj. Kaj preskaŭ samvortaj

Ifigenio en Taŭrido

Akto unua-Sceno unua

IFIGENIO

Al via ombro, pintoj moviĝemaj
De l'densa kaj antikva arbareto.
Al la sanktej'kvietaj de l'diino.
Ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras
Simile kiel la unuan fojon:
Ne povas mi al vi alkiutimigi.
Jam multajn jarojn min ĉi tie kaŝas
Plej alta volo, kiun mi obeas;
Mi tamen ĉiam sentas min nur fremda.
Ĉar ve! transmara estas miaj karaj!
Mi longajn tagojn staras sur la bordo
Serĉante per la kor'la Grekan landon;
Al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj
Respondas la ondegoj de la maro.
Ho, ve al tiu, kiu devas vivi
Por de la gepatroj kaj de la gefratoj!
Malĝojo al li rabas la feliĉon;
Forvagas flanken ĉiam liaj pensoj
Al la gepatra domo, kie suno
Al li aperis la unuan fojon,
Kaj sandomanoj ĉiam pli kaj pli
En ludo alligiĝis reciproke.
La diojn mi ne juĝas; tamen vere
Plendinda estas stato de virino.
En domo kaj milit'la viro regas
En frenda land'li ankaŭ al si kelpas;
Li la posedon, li la venkon ĝuas.
Eĉ lia morto estas morto glora.
Sed la virino ĉio ĉirkaŭbaras!
Eĉ krudaŭ edzon obeadi estas
Por ŝi ne sole devo, sed konsolo;
Sed kiel mizeriga ŝi fariĝas.
Se en fremdlando pells ŝin la sorto!
Ĉi tie Toas, nobla viro, tenas
Min en katenoj sanktaj, tamen sklavaj.
Kun honto mi konfesas, que mi servas
Al vi diino, mia savintino.
Nur kontraŭvole! Tamen mian vivon
Al vi dediĉi devus mi hvere
Al vi, Diano, ĉiam mi esperis,
Ankoraŭ nun esperas mi senĉese.
Vi min, filinon de plej granda reĝo,
En vian sanktan aman brakon prenis,
Por savi de la morto. Ho, diino,
Se tiun grandan viron, kiun vi
Turmentis, postulante la filinon,
Kaj vi al li oferis la plej karan,
Se la Agamemnonon disimilan
Vi de la Trojaj muroj disbatitaj
Venigis glorie en patrujon lian,
Se vi al li konservis la edzinon,
Elektron kaj la filon, la trezorojn:
Vi ankaŭ min, redonu al la miaj
Kaj min, savinte de la morto, savu
De l'ĉi-tiea vivo, dua morto!

Tradukis L. ZAMENHOF.

IFIGENIA

A la vostra ombra, movedices copes
d'aquest sant boscant vell i ple de
branques
lo mateix que en el temps de la deessa,
hi entro més frísosa avui encara:
que 'l dia en que 'y vaig dà aquells primers
passos:
la meva ànima no acaba d'avenir-s'hi.
Ja fa mols anys que'm serva aquí reclosa
un alt voler, an el que jo 'm rendeixo;
pro com el primer jorn sò forastera.
Que 'm separa, la mar, dels que jo estimo
i passo ores i ores a la platja
vers la terra dels grecs anelant sempre,
i contra 'ls meus sospirs no més revènen
sordament les onades bramadores
Al! Malaurat aquell que, lluny dels propis
està sol! Tot plaer se li amarganta,
i els pensaments tot-ora sí l'ednuen
vers la casa pairal, allí on va veure
el sol aclarí 'l cel el primer dia,
i aon els jocs lleugers de l'infantesa
l'anaven enllaçan amb uns i altres...
Jo no 'm queixo del déus, però es ben trista
tant mateix, la sort nostra, pobres dónes!
Es poderós a casa i a la guerra.
l'ome, i's sab valer siga allà on siga:
tot posseï es per ell, tota victòria,
i sempre té amanida una mort noble.
Les dítxes de la dóna sòn meçquines.
Ja es consoli i es dever ensems, per ella,
l'estar subjecta al dur marit; i ai pobre,
si mala sort la porta a terra extranya!
Així, jo, que ara amb fermes i sagrats braços
sò aquí pel noble Thoas retinguda,
quina vergonya 'm dono, oh tu, deessa,
d'aver de confessar que sols per força
vaig servint ton altar!... Tu que'm salwares!
Ma vida avia d'esse-t consagrada
per servi-t llurement, i encara espero
en tu, Diana, que, al mirar la filla
del rei més gran que y ha damunt la terra
de mort amenaçada, la prengueres,
en tos divins i piadosos braços.
Filla de Zeus! Si an aquell ome insigne
al qui, afigit, la filla demanaves;
sí al gran Agamemnon, que als déus

s'assembta
i que en l'altar te va donar la filla,
dels murs vençuts de Troia a casa seva
has tornat gloriós, tornant-lo als braços
de l'esposa, dels fills, de quant estima;
torna-m'hi també a mi! Ja que 'm salwares
de la mort, salva-m, doncs, d'aquesta vida,
que ara es per mi com una mort segona!

Tradukis J. MARAGALL.

GAJA KRISTNASKA MEDITADO

PRI ADAMO KAJ ESPERANTO

(Fino)

Per tiu ĉi lulkanteto Adamo tute akiris sinceran amon de sia bela edzino, si ridetis tremante kiel la lotus-floro ĉe lia brusto per granda deziro de l'feliĉo.

En rozarbareto najtigalo trilas, ke en ĉirkaŭpreni ĉiela amo disfloras, ke ĝi en reciproka interkompreniĝo povas jam ĝui en sankta harmonio feliĉan kontentiĝon de la koro.

Mi ne volas priskribi, kion ni povas jam legi en la biblio. Oni diras, ke Evo pripensante «en kio konsistas la vera libereco» demandis pri tio iam la diablan serpenton, kiu koncerne Adamon, ankoraŭ plena de ĵaluza venĝo, per malica mensogo, respondis, ke tio estas facile atingebla. Ĝi diris al Evo, ke ŝi povu nur ĝui la malpermesitan frukton el arbo de la scienco, se ŝi volus fariĝi ĉiopova, ĉioscia, unuvorte egala al Dio mem.

Kaj Evo konfidante al tiu malica serpento, ŝi manĝis tuj, sen ia pripenso, la malpermesitan frukton kaj donis ĝin manĝi ankaŭ al sia edzo. Evo, kiel bona edzino, devis pli frue pritrakti tion kun sia edzo Adamo kaj konsiliĝi kun li, sed tion ŝi estis forgesinta, ŝi forgesis eĉ sian Patron Dian.

Kaj Adamo, tiu kompatinda homo, kutimita ĉiam obei sian edzinon, kiel multaj bonaj edzoj tiel faras ĝis hodiaŭ, ĉiam manĝis sole tion, kion ŝi por manĝaĵo al li preparadis. Sed tio ne povas lin senkulpigi, ĉar li devis agi je sia prudento. Li kiel viro kaj edzo devis pli bone gardi sian edzinon. Li kiel homo pli sperta, pli altrajta kaj pli maljuna, li devis severe interveni en tiu ĉi afero tuj, kiam li, vidis, ke Evo ree komencas kun tiuj malicaj serpentoj unuigi. Sed nun estas vane verŝi larmon de pento, ĉar terura nigra ombro de arbo de scio minacas kaj rampas jam ĝis kiam antaŭ la juĝa seĝo de Dio, kie ĝi plendas kontraŭ la homoj.

Tion rigardante la homoj tremegis pro timo kaj aŭdante severan voĉon de Dio kaŝiĝis kun ĝemoj. Liaj dentoj laŭte ekfrapis, iliaj haroj stariĝis; plorante ili tordiĝis en jasmearbetaĵo, ĝis keruba glavo estis forpelinta ilin el paradizo per vortoj:

«For en la polvon! Vi estas kondamnitaj al la morto!»

Nova ilia horizonto de terĝlobo maldolĉe bonvenis ilin:

Por kio vi venas ĉi tien? Dio indulgu vin petulojn. Viaj okuloj estas plenaj de larmoj, kiuj longe devos faladi sur ĉi tiu malmolan teron, antaŭ ili plenigos ĝiajn valojn.

Ne ploru! Espero konsolu vin sur la vojo, kiu kondukos al la bela sonĝo de l'homaro. Ne ploru!

Vidu sur la roko la hirundajn nestojn kaj miellaboraĵon de dolĉaj abeloj. La Naturo estas rozkolora laborejo, kie agas la bela vivo, kiu vin instruos labori, ĉar en laboro estas amo ĉiam pura, granda, sankta, en kiu vi povos trovi feliĉon, vian perditan paradizon. Por amo vi kresku, floru kaj laboru!

En gigantaj muroj de Naturo regas la vero kaj tio estas Dio; kontraŭ la Naturo staras eraro kaj tio ĉi estas abismo.

Tiamfluganta hirundo per siajflugiloj tuŝetis la hararon de Evo, kantante sian mistikan kantaĵon, kvazaŭ ĝi petegus amon por siaj infanetoj.

Kaj la abelo per aerbloveto alflugas kaj kompateme kisas Adamon, kvazaŭ ĝi volus diri: «Dolĉa laboro salutas vin!»

La nokto venis kun luno kaj brilantaj steloj, ĉielo tute sennuba kviete rigardis la teron. Post longa silento Evo per voĉo iom tremanta demandis Adamon: «En kio do konsistas la vera liberiĝo? Adamo mallaŭte respondis:

«Nun en la morto». Evo ree demandis: Kaj kiam venos la horo de la liberiĝo? Adamo kun malĝojo diras: «Post nia suferado, laŭ Dia volo. Tiam ni estos denove liberaj, kiel aero, sed post la morto».

Eva incitite ribelis: Ĉu nia peko estas tiel granda, ke la ĉiela regno devis puni ĝin per morto? Adamo timeme: «Ne parolu tiel edzino, ni suferas juste. Benata estu Dio, kiu favore donis al ni ĉian feliĉon, sed ni ne volis eĉ lian plej malgrandan ordonon plenumi. Ni preĝu, ke nin ne timigu la noktaj fantomoj; ni esperu, ke post nia longa prospera laboro, Dio pardonos nin. «La Forto mistera de l' mondo nin benu, ke amo kaj vero ekregos sur tero, por ke ni atingu la celon». (El «Amo» de Cezaro Jordano).

Ni scias el biblia legendo, ke post kelkaj miljaroj la lingvo de l' homoj konfuziĝis pro malbenado de la fiera Babelturo, kiun la homoj volis konstrui altan ĝis la ĉielon, por ke ili povu regi je l' trono de Dio.

Tio ĉi estis unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la homaro, ĉar Dio estis jam volonta en sia justeco tute ekstermi ĝin. Multe da homoj devis kaj devis tiel suferi pro tiu ĉi mikso de la lingvoj, kaj tre ofte en siaj sonĝoj ili transportadis sin al tiu legenda paradiza antaŭbabilona tempo, kiu perdiĝis por ili ŝajne eternel!» (Dr. L. L. Zamenhof).

«Kvankam jam pasis miloj da jaroj
de tiu puno de Dio,
regas ankoraŭ interhomaroj
Malamo, senharmonio!» (M. Goldberg).

La dispelitaj homoj parolinte iom post iom per multaj konfuzigitaj lingvoj, ne povis fine kompreni unu la alian. Post longa tempo altiĝas la voĉo de grandaj profetoj pri veno de Savonto, montranta kiel per amo trovi la perditan paradizon.

Tiam poetoj kaj profetoj komencis serĉadi perditan ĉielan Universfundamento de unua arta homlingvo, per kiu ili esperis trovi la Amon, kiun Kristo ordonis.




Mirakla homo de Dio estis sendita. Oni diras ke Dro. Esperanto eltrovis tiun fonton de lumo, post dek-kvarjara serĉado sur Eufrataj bordoj, kie staris iam la arbo de scio.

Nia majstro Dro. Esperanto, kies amo, kiel paca Esperstelo por la homaro brilas, estis mem pri si dirinta, ke li estas ero en la ĉeno de la disvolviĝo de la homaro, ĉeno, kiu komenciĝis antaŭ la historio, kies etendo estas senfina, nedifinebla kaj ni scias, ke li volas konduki nin «sub la sankta

signo de l'espero» al savo, ĉar li montras al ni bonan vojon al amo, kiun nia Savonto estis predikanta, la veran vojon de homara vivo, de «Nova Testamento». Jam leviĝos baldaŭ la suno por lumi kaj, «en la mondon venos nova sento» por brili senfine!

Nur por sopirema amo ni kantas hodiaŭ:

Bohema kanto



2. Kiu profetita, ni sopiru,
estas nun sendita, Lin admiru Vivu Li k. t. p.
3. Homan korpon prenis, ni sopiru,
tiel al ni venis, Lin admiru. Vivu Li...
4. Goliato rabita, ni sopiru,
homo estas savita, Lin admiru.
Vivu Li purega ĉiel' reĝ' bonega,
ĉiam Lin admiru!

EM. BATĚK.
Ričany

AL SUBIRANTA SUNO

Adiaŭ !Sun! kiu sendas
al mi lastan lumon vian
kaj serĉante novajn landojn
tra l'horizonto kaŝiĝas.

Kiam morgaŭ vi revenos
se feliĉa viŝin vidas,
inter via suna lumo
sendu ŝin kiseton mian.

Madrid


A. DE ORRIOLS.

MONUMENTO AL D-ro ROBERT
BARCELONA



Ĉefa skulptaĵo de la Monumento

BARCELONA



Modernaj konstruaĵoj

LA SUNO KAJ LA VENTO

La Suno kaj la Vento interdiskutis kiu el ili estis pli kuraĝa.

La interdiskutado estis daŭra, ĉar neniu el ili volis cedi.

Vidante ili ke sur la vojo iradis sinjoro, ili decidis pruvi siajn fortecojn batalante kontraŭ li.

—Vi vidis—diris la Vento—kiel nur mi min ŝetante sur lin mi dispeciĝos liajn vestojn.

Sed ju pli kuraĝiĝis la Vento, des pli premigis la viro sian vestaĵon, gruntante kontraŭ, tiu: sed irante, ĉiam irante.

La Vento, kolere, faligis sur tiun vojaĝanton pluvon kaj neĝon; sed tiu viro ne haltis.

Tiam komprenis la Vento, neeble forpreni eĉ lian surtuton.

Ridatis la Suno, montriĝis inter du nuboj, revarmigis la teron kaj tiu bona sinjoro, kiu sin gajigis pro tiu agrabla varmeco, fortiris sian surtuton kaj enmetis ĝin sur sian ŝultron.

—Vidu—diris la Suno al Vento—, per la bono oni atingas pli ol per la malbono.

Tradukis P. Aguiló.

TOLSTOJ.

LOURDES'A INTERNACIA LIGO ESPERANTISTA

Celo.—1.^o *Koni* kaj senpartie *konigi* al scienculoj, pensuloj, scienculoj de ĉiulandoj kaj ĉiuopinioj (Katolikoj, Protestantoj, Liberpensuloj, ktp.) sincere amikoj de Scienco, Progreso kaj Vero, la *mirindaĵojn*, kiuj okazas en la sudfranca vilaĝo *Lourdes* (pron. lurd.) *senĉese* kaj precipe dum la dua duono de la monato Aŭgusto, kiam multaj malsanuloj, forlasitaj de la kuracistoj, kiel tute *nesaniĝeblaj*, trovas subitan resaniĝon, kiun ĝis nun ne provis klarigi la medicina scienco kaj altiras al Lourdes ĉiutage multajn milojn da vizitantoj.

2.^o Interligi per Esperanto ĉiujn multnombrajn, kiuj diverskiale, interesiĝas pri la lourdes'aj okazintaĵoj kaj liveri al ili utilajn sciigojn.

Oficiala organo.—La oficiala organo de L.I.L.E. estas LA KORESPONDANTO.—ĉiusemajna gazeto ilustrita (jarabonp. 10 fr.) enhavanta ĉiumonate du meteorologiajn artikolojn por *science* anonci, kun 80 por 100 da certeco, 15 tagojn antaŭe, la veteron en la tuta Eŭropo—kiu, depost la 16an de Julio, enhavos la plej novajn por sciigojn pri Lourdes'o: *oficialaj raportoj* pri resaniĝoj; *kritikaj artikoloj*, skribitaj de specialistoj, precipe kuracistoj; *rakontoj*, *leteroj*, *adresoj*, *portretoj* de resaniĝuloj; *movado* de la vizitantoj; unuvorte iom post iom, ĉiuspecaj dokumentoj pri tiu pasiema afero.

La rolo de la gaceto estas nur informi: sekve, la Direkcio *plezure* ricevos kaj laŭ *disponebla loko*, publikigos ĉiujn *lojalajn* polemikojn kaj diskutojn, kiuj povos ankoraŭ pligrandigi la ĝeneralan intereson kaj pruvi, novama-

niere, ke Esperanto estas taŭga por kunigi la plej *opinie* malproksimigitajn homojn.

Kondiĉo unika.—Ĉiuj Esperantistoj povas fariĝi ĉiamaj anoj de L.I. L. E. pagante *unufoje* 10 frank- (4 Sm.) Neesperantistoj povas esti honoraj anoj samkondiĉe.

Kiuj pagos 100 frankojn (40 Sm.) tiuj estos *ĉiamaj* anoj kaj abonantoj de la oficiala organo, *aŭ ĝis kiam*, fine de aĵn jaro, li *petos* kaj reenspezos la diritan sumon; estas tre facila mezo por fariĝi *senpage* ano kaj abonanto.

Sendi la leterojn kaj la monon al S-ro Administranto de LA KORESPONDANTO, 42, San Vicente, Valencia (Hisp).

GEDONACANTOJ POR LA ORDENO DE ISABEL LA CATÓLICA AL SRO. DRO. ZAMENHOF, NIA KARA MAJSTRO (DUA KAJ LASTA LISTO)

	Ptj.
Sumo antaŭa 293'05 S-ro Garzon Ruiz, 5—Domenech, 1—Roca de Togerres, 1—Pons Aragonés, 1—Ripoll Busquets, 1—Fradera Carrete, 1—Sala Gomila, 1—Ivaneda Callejas, 1—Baesa Lederma, 2—Gutiérrez Zapies, 6—Del Prado Benavider, 2—Romero García, 0'50—Rubiales Mora, 1—Mugaña Mora, 1—Martín González, 1—Moreno Domario, 1—Lorenzo Medina, 1—Fernández Morales, 1—Colmarza León, 1—García Muñóz, 1—Herrera Guerrero, 1—Muñóz Escobar, 1—Kelkaj junuloj de Esperanto Cruz Roja de Villacarrillo, 6'50—G. Flores, 2—Gómez Ramo, 1—López Rodríguez, 1—Morcoso, 1—Johano Flaquer, 1—Fernández Perales, 1—Julio Mangada, 2—Valencia-Grupo, 20—Tute, 361'05	300
Krucordeno de Isabel la Católica, lega oro brilantiĝita.	60
Leg'argenta plako kun dediĉo kaj plibonigo en la ujo, kiu estas el rusa felo.	1'05
Portrinko el skribisto por l'afišo hispane kaj esperante verkita por monti la krucordenon en la montrejo.	361'05
Tuto.	361'05

La fakturo de la juvelisto, leteroj kaj ceteraj pruviloj de la gedonacantoj estas sendotaj al H. S. p. p. E. por ĝia enarĥivigo.

Jen la teksto esperanta de l'afišo Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII^a ordonis la elpensinto de Esperanto Doktoro Zamenhof Komandoro de la Krucordeno de Isabel la Católica. La hispana esperantistaro donacas al sia majstro l'apudan ordenon.

La teksto de la dediĉo estas:
AL LA GLORA—el pensinto—de la lingvo—Esperanto—Dro. L. L. ZAMENHOF—La hispana—esperantistaro—5^a Kongreso.

Elspezoj
La krucordeno estas aĉetata de la juvelisto Cejalvo García, provizisto de la Reĝa Domo kaj de kelkaj ministrej^{oj}, strato Cruz, n.º 5 kaj 7.

Yen ĝia kosto:

DIVERSAJ SCIIGOJ

Alia urbo provos esperanton.—Al ĉiuj Esperantistoj kiuj deziras ian ajn informon pri urbo Tacoma aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo nia komerca klubo estas nun preta respondi per Esperanto. Ni esperas ke ĉiuj interesataj prenos ĉi tiun okazon por informigi sin pri la vasta kaj mirinda Okcidento. La Okcidento estas la estonta lando; Washington estas la ŝtato de promeso, kaj senhezite ni povas rekomendi Tacoma kiel la plej belega kaj la plej alloga urbo en nia ŝtato, ĝi estas moderna urbo kun pli ol 100,000 loĝantoj. Ĝia alloga ĉirkaŭaĵo, ĝia milda klimato (somera temperaturo 60-65°, vintra 40-45), ĝia beleco kaj pureco igas ĝin ideale urbo por la hejmsercanto. Ke tio estas fakto atestas la ĉeesto en nia urbo de multe da progresemaj alilanduloj. Skribu hodiaŭ al «Commercial Club», Tacoma, Washington, U. S. A.

**

De Valencio.—La Urba Valencia Koncilantaro enpresigis la oficialan programon de la granda Toiro hispana, france kaj esperante; tio estas granda antaŭ enpuŝo por nia afero.

**

De Madrido.—La Konsilantaro de Publika Instruado informis favore la petskribon de la Madrida Esperanta Grupo pri la enkonduko de la lernado de Esperanto en la superaj lernejoj de la Hispana Kortego; eble baldaŭ la Ministro kiu estas tre klera kaj progresema viro dekretos tiu gravan novaĵon.

Sur la Madrida Oficiala Gazeto oni publikas la 15^{an} de la kuranta monato Reĝan Ordonon de la Ministrejo de Publika Instruado kaj Belartoj, permesante la klarigadon de Esperanto en la publikaj oficialaj lernejoj per profesoroj difinitaj de esperantaj asocioj, certigante kiel oficiala merito la aproba atesto.

Tio estas granda triumfo por nia afero.

ROMAN AYZA.

**

Gravega.—La pasinta Junio vizitis la urbestron komisiono de la barcelonaj esperantistoj kiuj petis al li lian helpon por ke unu el la ĉefaj stratoj estu nomata «Esperanto». Ili akompanis sian peton de dokumento subskribita de la societoj kaj grupoj esperantistaj kaj la plimulto de la diverspolitikaj societoj.

La urbestro promesis presenti li mem la proponon al la urbkonsilantoj, oni kredas ke la elektota strato estos unu el la nomataj de la reformo.

**

Kongreso.—La 24^{an} kaj 25^{an} okazis ĉe Taragono la II^{an} kongreson de la K.E.F. En ĝi ĉeestis esperantistoj de diversaj urboj kaj vilaĝoj. De la stacidomo oni iris manifestacie, ĝis la urbestra domo kie estis akceptitaj de la aŭtoritatoj. Poste la urbestro inaŭguris esperantistan ekspozicion kaj oni dancis la rondon antaŭ la urbestra domo.

Je la 5^a posttagmeze komencis la unua kunsido de la kongreso dum kiu oni legis telegramon de Dr. Zamenhof salutante la kongreson, varma kaj daŭra aplaŭdado salutis Lin.

La urbestaro regalis la kongresanojn per vino honora.

Vespere okazis la disdonado de la premioj de la literatura konkurso. 25^{an} Matene meso kun parolado esperanta kaj dua kunsido de la kongreso. Tagmeze festeno ĉe la Hotelo Continental; toastis la aŭtoritatoj (kelkaj el ili ekparolis esperante) kaj kelkaj esperantistoj. Je la 5^a, tria kaj lasta kunsido en kiu oni decidis ke la venonta kongreso okazu ĉe Vik'o.

Vespere koncerto ĉe la «Orfeo Tarragoni» kaj poste balo en la teatro «Principal» kiu finis je la 2^a nokte.

**

Kondolenco.—La 29^{an} de Junio mortis ĉe Sabadell'o la direktoro de «Kataluna Esperantisto» Sro. Dominiko Serda. Sia enterigo estis vera pruvo de la simpatioj kiuj ĝuis dum sia vivadotiu lerta samideano. Pace ripozu.

**

Vizito.—La 12^{an} de Julio estis honorata nia verda vendredo, ĉe Espero Kataluna, kun la ĉeesto de la klera esperantisto Sro. Codorniu de kiu ni ĝuis la kunestado dum la tuta vespero. Koregajn dankjon pro la vizito.

**

Datreveno.—La 24^{an} datreveno de la apero de la unua lernolibro estis festata en Barcelono ĉe la «Otelo Mundial Palace» por multaj geesperantistoj. Dum la festeno estis granda entuziasmo inter ĉiuj precipe dum la toasty kiujn faris la S-roj Sabadell del la grupo «Barcelono», Renom del «Espero Kataluna», Valsells del «Paco kaj Amo». Camdelacreu del «La Rondo», Gili del «Barcelona Stelo» Muga del «Esperanto kaj Patrujo», Piñol del «Tero kaj Libereco», Grau del «Universala Frateco», Bravo del «Novan Vojon», kaj aliaj kies nomoj mi ne memoras del «Forigu Barojn» «Kulturo», kaj «Aruroro».

Sro. Bremón per lerta parolado resumis la feston.

Oni proponis sendi telegramon al la kara majstro, propono kiu estis en tuziasme aplaudita.

J. LLORACH.

**

Katolika Stelo: Sabadell.—Kun granda entuziasmo tiu ĉi societo solinegis sian patronan feston kiu okazis la 5^{an} de la nuna monato. Je la 12^a matene oni oferis meson dum kiu nia estimata samideano P. Marko Lliró, E. faris elokventan predikon katalune konigante al la ĉeestantaro la celon de esperantismo kaj precipe tiun de Katolika Stelo petante al ĉiuj ke morale kaj materiale oni helpu ĝin. Ni gratulas P. Lliró pro lia entuziasmiga parolado. Je la 4^a vespere okazis solena literatura kaj muzika festo en kiu partoprenis lertaj geesperantistoj kiuj estis varme aplaŭdataj.

Poste oni ludis katalunan propagandan verketon pri esperanto titolata «Esperanto Practich» kiu multe plaĉis kaj entuziasmigis la ĉeestantaron.

Fine oni kantis la esperantan himnojn «La Espero». Al la dirita festo ĉe-

tis kaj partoprenis en ĝi kelkaj anoj de «Lumon» de Tarrasa kaj de «Esperanta Nesto» de Barbará.

**

Esperanto kaj Patrujo.—La 5^{an} de la pasinta Junio okazis ekskurso al la proksima vilaĝo Moncada, por propagandi Esperanto'n kaj samtempe viziti la putojn da akvo, por kiu celo ni atingis permeson de la Urbestro Moŝto.

Ni ekiris de Barcelono, pli ol cent, je la 2^a posttagmeze, kaj ni alvenis en la stacidomo de Moncada je la 2^o kaj 30 minutoj kie ni renkontis sinjorojn Buxó kaj Cervera, lertaj esperantistoj de tiu ĉi lasta vilaĝo, kiuj akompanis nin viziti la akvujojn kaj la defluejon de l'akvo, kie ni trinkis tre bonan akvon.

De la defluejo ni iris al la nova ponto sur la rivero Besós ĝuante kaj admirante belan pejzaĝon dum la promenado.

Oni fotografiis nin sub la ponto kaj poste ni iris al la sidejo de la Societo «Colon», kie okazis konferenceto, klarigita de anoj de «E. kaj P.» sinjoroj Anglada, Bermudez, Rodriguez, kaj Albiñana kiujn oni aplaudis post iliaj mallongaj sed esperantistigaj paroladoj.

**

Palafrugell.—La 13^{an} kaj 14^{an} de Agosto, okazis la dua Geronprovincia Esperantista kongreso, al kiuj ĉeestis multaj samideanoj el diversaj urboj.

Dum la unua tago je la 11^a 1/2 matene okazis la akcepto de la kongresanoj en la Akceptejo (sidejo de la societo «Paco kaj Amo»), je la 12^a Solena malfermo de la kongreso, presidata de la Urbestro, (en la Teatra-Salono «Centro Fraternal») je 3^a posttagmeze, vizito al la Elektra Fabriko je la 4^a labora kunsido, je la 9^a nokte okazis 1^o la ludo de la triakta verko de Molière tradukita de Dr. L. Zamenhof, titolata «Georgo Dandin», ludita de gesamideanoj de la grupo «Frateco» de S. Feliu de Guixols kiuj plene sukcesis kaj 2^o la monologo «La Pipamanto» ludita de S-ro. E. Dalmau ano de «Gerona Esperantistaro».

Dua tago je la 9^a matene vizito al la korkfabriko de S-roj Miguel Vincke & Meyer kiu estis vere interesa, je la 10^a dua labora kunsido kaj fermo de la kongreso je la 12^a ekskurso, al Sankta Sebastiano kaj je la 13^a frata festeno.

Vespere je la 5^a ekskurso al la someraj marbordoj Llafranc kaj Calella kaj je la naŭa solena balo dediĉita al la gekongresanoj.

Kiel memoraĵo de tiu grava kongreso oni eldonis broŝuron enhavanta multajn kaj tre belajn fotografiaĵojn de la kongresurbo.

**

Espero Kataluna.—Tiu ĉi Societo, baldaŭ malfermos novajn kursojn, klarigitaj de lertaj esperantistoj, daŭrigante la amuzaj verdaj vendredoj kiuj tiel sukcesis.

Ankaŭ inaŭguracios serion da ekskursoj, sciigitaj oportune.

**

Al Antverpeno.—La karavano kiun organizis la Societo «Espero Kataluna» tre bone sukcesis, ĉar en ĝi partoprenis granda nombro da societanoj al kiuj aliĝis kelkaj samideanoj por iri kune al la kongresa urbo.

Ni rimarkigas ke en tiuĉi Kongreso, partoprenis pli granda nombro da katalunoj olen la antaŭaj Kongresoj eksterlandaj.

**

De Manlleu.—Vere sukcesis la festo kiun organizis la grupo «Esperanta Amo». Partoprenis en ĝi F-inoj J. R. kaj M. Caballeria, C. Colomer, F. Parredas, M. Vilalta, C. Castells, M. Anfiró, kaj Sroj. Coll Calvet, Coll Espalader, R. Buch, P. Ramoneda, M. Jaumeandreu, G. Altafaja, kaj aliaj kies nomoj ni ne notis. La ĉeestantaro estis tiel multnombra ke la salonoj de la Societo «Rafael de Casanova» kie okazis la festo, ne sufiĉis por enhavi la invititoj.

Ĉiu partoprenintoj estis varme aplauditaj kaj fine S-ro Coll Calvet resumis la feston per lertega kaj trafa parolado.

**

Sta. Perpetua de Moguda.—La 13^{an} de Aŭgusto okazis agrabla festo organizita de la grupo «La Kamparo», partopreninte en ĝi F-inoj A. kaj C. Rocabrana, J. kaj M. Jardi, T. Torruella, kaj J. Soley, M. Torras, J. Valls, P. Oller, J. Jardi, M. Borrás, J. Más, Y. Oriol, J. Sala, Dro. J. Miró, Pastro C. Rosell, el tiu urbeto kaj S-roj J. Clerch kaj D-ro J. Argemi, el Sabadell; Pastro J. Coll, el S. Feliu de Codines; P-tro. R. Garriga el Sardanyola; kaj D-ro J. Buxó, el Moncada.

Fine ĉiuj la ĉeestantoj entuziasme kantis nian himnon «La Espero».

BIBLIOGRAFIO

LA TURISTO KUN LA VERDA STELO.—Tia estas la titolo de nova monologo verkita de la sprita S-ro de O. Van Schoor.—Ni rekomendas ĝin al la teatraj aktoroj esperantistaj ĉar ĝi sendube estas nediskutebla ridegilo. La prezo de tiu rekomendinda verkaĵo, eldonita de Centra Esperantista Belga Oficejo, estas 0'16 sm.

LA REĜO DE LA ORA RIVERO AŬ LA NIGRAJ FRATOJ.—Esperanta Biblioteko Internacia.—La 18^a aperinta volumo de tiu interesa biblioteko, estas la traduko farita S-ro Joy Kellerman de la fama verko de John Ruskin. Ni rekomendas ĝin al niaj legantoj. (Prezo 0'10 s. m.)

FUNEBRA PAROLADO pri Louis de Bourbon, princo de Coné (Bossnet). El franca lingro tradukis Luois Bastien. Presa Esperantista Societo, rue Lacépède, 33. Prezo 1 (s. m. 0'40). La konatoj vortaj uzataj de la tradukinto ebligas la komprenon de tiu ĉi majstra verko, kiu estas tre rekomendinda.

DEMANDARO DE LA HISTORIO, LITERATURO KAJ ORGANIZAJOJ DE ESPERANTO, por esperantaj ekzamenoj.—R. de la Ladeveze. Friedrik Ader. Esperanto-Verlag. Dresdeno-A.

Fine la veraj esperantistoj atingis taŭgan verkon pri la movado de nia lingvo, ĉar S-ro R. de Ladeveze, kunigis demandaron kun trafikaj respondoj kies celo estas diskonigi la historion de nia Esperanto.

OSTLORN.—Vilaĝaj skizoj de S. Ulfers (el Holanda lingvo tradukis M. S. Wessel), prezo broŝ 1'65 s m.; (2 guldenoj), bindita 2'05 s m. (2'50 guldenoj) D. Van Sijn & Zoon (Rotterdam-Holland).

Agrablan momenton oni atingas per la legado de la dek rakontoj enhavitaj en tiu literatura libro, jam tradukita en aliaj lingvoj. Ni ne dubas ke la esperantistaro tre bone akceptos tiun ĉi belan verkon.

ALINE.—Svisa rakonto (C.-F. Rannez) tradukita de René de Saussure. Prezo 1 s m. frankite. Universala Esperanta Librejo, 10, rue de la Bourse. Genève.

Tre interesa rezultas la sviza rakonto bone tradukita de S-ro de Saussure. Ĝin rekomendas al niaj legantoj.

ESPERANTISTA KANTARO.—(17 bildoj originalaj aŭ esperantigitaj aranĝita de karl Jost. Zurich (Svisujo). Universala Esperantista Librejo, rue de la Bourse, 10, Genève.

Interesa kolekto kies celo estas diskonigi la belajn kantojn esperantistajn.

VICHY GVIDLIBRETO.—Publikigita sub la aŭspicioj de la farma kompanio *Vichy Etat*. Pakaĵoj enhavantaj 10, 20, aŭ 30 gvidlibretojn estos senditaj senpage, al ĉiuj esperantistaj grupoj, kiuj demandas ilin. Sin turni al la Ĝenerala Sekretario de la G. E. V. S-ro Ceard, 48, Boulevard Carnot, Vichy.

Muzikaĵoj

SALUTO AL BELGUJO.—Poezio de H. Menalda-muziko de F. de Menil, (Eldonaĵo «Espejo»). Princestraat, 48 (Haago) Nederlando, Pr. 0'400 sm.


HIMNO ESPERO.—Vendata ĉe la aŭtoro. 179, Boulevard Pereire (17). Ĉe la Presa Esperantista Societo, 39, rue Lacépède, Paris, kaj ĉe la Librairie de l'Esperanto, 15 rue Montmartre, Paris, senrabata 1'50 fr.

Nova muziko estas verkita de S-ro H. de Coppet por la belega poezio de D-ro Zamenhof.

PATRO NIA.—Esperantaj vortoj de D-ro L. L. Zamenhof. Religia kanto kun akompano de fortepiano (Harmonium aŭ orgeno): Muziko de Manilius Hervig.—Eldonejo Verlag, Germana Esperanta Librejo, Leipzig: Prezo m. 1'55 (s m. 0'75).

Belega verko kiun ni rekomendas al niaj abonantoj ĉar ĝia enhavo veer estas interesa.

SOLVO DE LA SARADO MOZAIKO



ESPERANTO GERMANA ESPERANTISTO

★ RESTORACIO ★

Strato Asalto, 54 - BARCELONO

Biero, vinoj, ĉampano, kaj ĉiuspecaj likvoroj, Esperanta manĝaĵo ĉiusemajne.

Esperantistoj! Veni tien-ĉi!

ONI PAROLAS ESPERANTE

Monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto
Monatsschrift für die Verbreitung der Esperantosprache

Tiu ĉi gazeto, unu el la plej malnovaj esperantaj gazetoj, estas redaktata esperante kaj germane, kun ĉiun variita enhavo: Originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj: propagando, kroniko, literaturo, bibliografio, korespondoj, konkursoj, konsiloj por la praktika vivo, instruoj por lernantoj, oficialaj informoj ktp.


Jare abonprezo 3 Mk. (1.50 \$m.) en ĉiuj landoj.
Prova abono per 6 monatoj 1.50 Mk. (0.75 \$m.)

Esperanto Verlag Müller & Borel, Berlin SW, 68, Hindenstr. 18-19

LUEBLA

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI

ONI VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Ballepi

Strato Ample, 43-BARCELONA